

Veranstaltungshinweise

Wir haben Esp.-Lernrunden für Anfänger (Einzelheiten: Anne; s. Impressum) u. Fortgeschrittene (do. 20:30-21:15 Uhr per Skype). Und:

19.01.2017 19:30 Uhr	<i>Heidekate</i> , Melkbrink 49, 26121 Oldenburg	Vereinstreffen
23.02.2017 19:30 Uhr	<i>Kogge</i> , Rathausplatz 7, 26931 Elsfleth	Vereinstreffen mit Jahreshauptversammlung
16.03.2017 19:30 Uhr	<i>Weserterrassen</i> , Strandallee 10, 26954 Nordenham	Vereinstreffen
20.04.2017 19:30 Uhr	<i>Heidekate</i>	Vereinstreffen
18.05.2017 19:30 Uhr	<i>Kogge</i>	Vereinstreffen

Gäste sind willkommen. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite (s. unter „Impressum“) entnommen oder bei Alke Geveke, Tel.: 0160-3760850, erfragt werden; allerneueste Infos: <https://twitter.com/egu1995>. Außerdem:

10.-17.04.2017	33. Int. Frühlingswoche (PSI)	Essen-Kettwig
14.-22.04.2017	AMO PRINTEMPaS	Gresillon, Frankreich
24.-28.05.2017	Printempa BARO	Bad Münde
02.-05.06.2017	94. Deutscher Esp.-Kongress	Freiburg
22.-29.07.2017	102. Esperanto-Weltkongress	Seoul, Südkorea
05.-12.08.2017	73. Internat. Jugend-Kongress	Aneho, Togo

Impressum:

<i>Zeitschrift:</i>	Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
<i>Erscheinungsweise:</i>	dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe, Netzseite: http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm
<i>Herausgeber:</i>	Esperanto-Gruppe Unterweser e. V. (http://www.esperanto.de/unterweser)
<i>Information und Redaktion:</i>	Anne Höpken, Schulstr. 13a, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837; Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368; Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044; Mario Müller, Tel.: 04732-1373
<i>Bankverbindung (für Beiträge und Spenden):</i>	Raiffeisenbank Oldenburg eG, IBAN: DE26280602281200160000 Kassenwartin: Dörte Bierkämper

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 48

ISSN 1861-3330

Feb. – Mai 2017

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>




Elsfleth, 18.11.2016: Im Fachbereich Seefahrt und Logistik der „Jade Hochschule“ wird die Kommandobrücke des Frachtschiffs „Ems“ simuliert, das – virtuell – in Australien unterwegs ist und von Vereinsmitgliedern gesteuert wird.

Elsfleth, 18a de Novembro 2016: En la fakgrupo marveturo kaj loĝistiko de „Jade Hochschule“ estas simulata la komando-ponto de ŝarĝoŝipo "Ems", kiu – virtuale – estas survoje en Aŭstralio kaj stirata de klubanoj.

13a Rata Rendevuo (Minden, 15a de Oktobro 2016)

Minden situas en la nordorienta Nordrejn-Vestfalujo kaj havas ĉ. 81.600 loĝantojn.



Ŝaktkluzo / Schachtschleuse

La urbo estas konata interalie pro sia historia kerno kun katedralo, foirplaco kaj "Obermarkt" ("Supera Foiro") kaj krome pro sia akvovoja kruciĝo de la Mezlanda kanalo kaj Vezero inkluzive plurajn kluzojn. Tiuj vidindaĵoj estis tial ankaŭ en la fokuso de la tra-urba gvidado antaŭtagmeze fasonita amuze kaj anekdotriĉe de Norbert Ellermann kaj ekskursŝipa rondveturo posttagmeze. Ĉion ĉi organizis la Ratkaptista Bando

perfekte kaj ĝuis la 32 rendevuanoj. Fine estis kafumado en bistroo ĉe la ŝaktkluzo. – Andreas

13. Rata Rendevuo (Minden, 15.10.2016)

Minden liegt im nordöstlichen Nordrhein-Westfalen und hat ca. 81.600 Einwohner.



*Mezlanda kanalo super Vezero /
Der Mittellandkanal über der
Weser*

Bekannt ist die Stadt u. a wegen ihres historischen Kerns mit Dom, Marktplatz und Obermarkt sowie wegen ihrer Wasserstraßenkreuzung von Mittellandkanal und Weser einschließlich mehrerer Schleusen. Diese Sehenswürdigkeiten standen daher auch im Fokus der Stadtführung am Vormittag, die unterhaltsam und anekdotenreich von Norbert Ellermann gestaltet wurde, und der Rundfahrt mit einem Ausflugsschiff am Nachmittag. All das organisierte die „Rattenfänger-

Bande" perfekt und genossen die 32 Rendezvous-Teilnehmer. Zum Abschluss gab es ein Kaffeetrinken in einem Bistro an der Schachtschleuse. – Andreas

Enigma

	1	2	3	4	5	
1						Horizontale 1: dolĉa substanco [sen finaĵo]; 2: provokanto en retforumo [kun finaĵo de adverbo]; 3: germane: angilo; 4: mallongigo de radono; 5: rondforma kuko; 6: finaĵo de estanteco; 7: skelet-elemento [sen finaĵo]. Vertikale 1: komenco [sen finaĵo]; 2: planedo; 3: impresio de resenditaj lumradioj sur okulo [sen finaĵo]; 4: fleksiĝema, malrigida [sen finaĵo]; 5: tio, kio estas plu post forpreno de parto.
2						
3				6		
4			7			
5						

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la vorton uzatan, por nomi rondan truon en la tersurfaco, ekzemple ĉe vulkano.



*Inundanta pluv'
daurigas, akvumegas
floroj kapneas
#hajko #esperanto*

Foto und Haiku von
Cornelia Klee, <https://twitter.com/nellie41de/status/738440546428067841>

**Vizitado je ŝipstirsimulilo
(Elsfleth, 18a de Novembro 2016)**

La en Elsfleth troviĝanta ŝipstirmulilo de la fakgrupo marveturo kaj loĝistiko de „Jade Hochschule” povas esti vizitata ankaŭ de gastoj. Tiun oportunon kaptis 11 klubanoj en sunplena Novembra posttagmezo. Unue estis enkonduke sciindaĵo pri la fakgrupo, temo marveturo kaj nia „praktika” tasko: Stiri ŝarĝoŝipon el la haveno de Sidnejo en la malferman Pacifikon. Poste ni estis distribuitaj al kvar komando-pontoj (t. e. al kvar ĉambroj kun po unu stir-aparataro kaj projekciita ĉirkaŭaĵo). Kaj ekis la afero. Ĉiu grupo stiris sian ŝipon preter pramo, malprofundaĵoj, operdomo, petrolŝipo kaj eĉ glacimonto. Kaj krom tio estis ja ankaŭ la tri aliaj „konkurantoj”. Ĉio iris sufiĉe glate, ĝis tamen neĝoŝtormo lige kun alta ondado finfine elreligis la aferon. Kiel kompenso, estis donacita al ni virtuala per-helikoptera flugo super la nokta Aŭstralia metropolo. – Andreas

**Besichtigung eines Schiffssteuerungssimulators
(Elsfleth, 18.11.2016)**

Der sich in Elsfleth befindliche Schiffssteuerungssimulator des Fachbereichs Seefahrt und Logistik der „Jade Hochschule” kann auch von Gästen besichtigt werden. Das nahmen 11 Klubmitglieder an einem sonnigen Novembernachmittag wahr. Zunächst gab es einführend Wissenswertes zu dem Fachbereich, dem Thema Seefahrt und unserer „praktischen” Aufgabe: Ein Frachtschiff aus dem Hafen von Sidney in den offenen Pazifik steuern. Dann wurden wir auf vier Kommandobrücken verteilt (d. h. auf vier Räume mit je einer Steuersimulationsvorrichtung und projizierter Umgebung). Und los ging's. Jede Gruppe steuerte ihr Schiff vorbei an einer Fähre, Untiefen, einer Insel, dem Opernhaus, einem Tanker und sogar einem Eisberg. Und dann waren da ja auch noch die drei anderen „Mitbewerber”. Alles klappte ganz gut, bis dann doch zuletzt ein Schneesturm, verbunden mit hohem Wellengang, die Sache aus dem Ruder laufen ließ. Zur Entschädigung wurde uns dann abschließend ein virtueller Hubschrauberflug über die nächtliche australische Metropole spendiert. – Andreas

**Vizitado je la Esperanto-grupo de Kassel
(Kassel, 17a ĝis 18a de Septembro 2016)**

La Esperanto-grupo de Kassel invitis nian grupon. Alke, Anke, Anne, Brigitte, Elisabeth, Ĵenja, Franz, Günther kaj Stefan veturis per du aŭtoj al Kassel-Harleshausen. Post la kafumado en klubĉambro de "kih" (Kulturinitiative Harleshausen) Bodo montris Kassel al ni. Tie okazis jam kelkfoje la "dokumenta", serio de ekspozicioj de nuntempa arto. Pro tio oni trovas multajn interesajn objektojn en la urbo, ekz. lito-konstruaĵoj sur hotelo. Bedaŭrinde pro pluveto ni devis uzi la buson de unu vidindaĵo al la aliaj vidindaĵoj, interalie stacidomo, urbohalo, muzeo por entombigkulturo kaj Grimms-muzeo.

En tiu semajno okazis maratono kaj la festivalo "Connichi" en Kassel. Tial ni vidis multajn laŭaspekte atentkaptajn junulojn, kiuj estis vestitaj kiel japanaj desegnofiguroj laŭstile de mangaoj.

Vespere ni ĝuis antaŭmenditan manĝaĵon kaj multajn dolĉaĵojn, kiujn la membroj de la Esperanto-grupo de Kassel ofertis. Wolfgang Günther laŭtlegis kaj disdonis tekstojn pri "La Tago de la 17-a Septembro 2016" kaj „ESPERANTO; DAŬRIPOVA EVOLUO KAJ EU (ideoĉeno)”; Bodo prezentis lumbildojn de la vojaĝo de la Esperanto-grupo al Greziljono en Francio kaj kvizon.

En la dimanĉo, post la bongusta matenmanĝo en gastejo "Pappen Anne" en Kassel-Harleshausen, ni veturis al la montara parko Wilhemshöhe por komuna migrado ĝis la monumento Herkules, ekkonilo de Kassel. Ni migris preter la kastelo kaj ĝuis la belan arboodoron. Ni uzis la ŝtuparon apud la akvofaloj kaj suprengrimis 535 ŝtupojn. Kelkaj ankaŭ supreniris pliajn 350 ŝtupojn al la monumento. Feliĉe la suno brilis, kaj impona panoramo super la urbo kompensis nin pri la fakto, ke ĉio ne estis videbla la antaŭan tagon.

Ĉar oni nur ekfunkciigas la akvofalojn kaj la fontanon je la 15:45 horo en la parko kaj ĉar ni devis veturi hejmen, ni vizitis la spektaklon nur per filmo en informejo. Post la malgranda tagmanĝo supre, ni ĉiuj veturis hejmen. Ni rememoras volonte la belajn tagojn kaj interesajn vidindaĵojn.

Ni dankas Bodo kaj Wolfgang por la gastameco, ĉar kelkaj povis tranokti ĉe ili. Ankaŭ ni dankas por la tuta aranĝo, gastumado k. t. p.

- Alke, Brigitte, Anne

Seminario pri Esperanto-Gramatiko (Mueß apud Schwerin, 21a ĝis 23a de Oktobro 2016)

Tiun seminarion organizis la Esperanto-grupo de Hamburgo kaj gvidis Akademiano Bertilo Wennergren, subtenata de Zsófia Kóródy (Esperanto-instruistino ĉe Interkultura Centro Herzberg). Inkluzive ilin kaj min estis 16 partoprenantoj; la granda plimulto apartenas al la menciita grupo. Mi, kiu ne estas membro de ĝi, partoprenis nur en la 22a de Oktobro 2016 de la 12:00 ĝis 16:30 horo. Estis preparita listo de gramatikaj temoj, kiel ekzemple la akuzativo. Mi ne estis kontribuinta al tiu listo, sed ekhavis la oportunon prezenti unu el miaj du ĉefaj demandoj al Zsófia kaj Bertilo en la tagmeza paŭzo (de la 12:00 ĝis 14:00 horo), ĉar tiam ne estis certe, ĉu post ĝi Bertilo povos daŭrigi sian partoprenon en la seminario (montriĝis, ke li povis daŭrigi). Post tiu paŭzo estis konsentite, ke en la seminaria rondo mi rajtis resume prezenti mian unuan ĉefan demandon (inkluzive la respondon de Bertilo). Ĝin mi do prezentis, kaj poste mi eĉ rajtis meti mian duan ĉefan demandon.

Mia unua ĉefa demando: Ĉu la Akademio de Esperanto (AdE) rajtas nuligi ion, kion ĝi antaŭe estis oficiale aldoninta al la Fundamento de Esperanto (ekzemplo: per kromdeklaro en 2013 nuligo je licenca interpreto de la apero de senapostrofaĵ "Zamenhof" kaj "Vaŝington" en la Fundamento; tiun licencan interpreton estis aldoninta AdE per la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro en 1974)?


Respondo al mia unua ĉefa demando: Laŭ Bertilo trafas la respondo jes, se, kiel jam historie (nome okaze de la maloficialigoj je "analogi" kaj "koncentr"), oni konsideras oficialajn aldonojn al la Fundamento ne kiel netuŝeblajn partojn de ĝi.

Noto: Ne estis diskutate (neniu insistis prie), ĉu tia konsiderado koheras kun la Antaŭparolo aŭ kontraŭas al ĝi.

Mia dua ĉefa demando: Ĉu uzo je la ne oficiala unuradikaĵo "korus" sinonime al la Fundamenta unuradikaĵo "ĥor" estas erara?

Respondoj – aŭ pli trafe – reagoj al mia dua ĉefa demando: Unue Bertilo menciis, ke ĉe radikoj kun "ĥ" estis enkondukitaj sinonimaj radikoj kun "k" anstataŭ "ĥ". Post mia atentigo, ke okaze de "korus" io tia ankoraŭ ne okazis oficiale kaj ke oni ja ne nur anstataŭigis la "k", sed ankaŭ aldonis "us", li koncedis, ke temas pri tute alia radikoj. Zsófia rimarkigis, ke la parolsono de "ĥ" ne estas en la gepatra lingvo de iuj parolantoj (ekzemple de hungaroj) kaj ke tial tiuj parolantoj havas malfacilon prononci tiun literon. Almenaŭ unu el la seminarianoj asertis, ke oni rajtas uzi novajn vortojn ne aperantajn en la Fundamento, precipe por novaj teknikaj aferoj. Mi atentigis pri tio, ke okaze de "korus" ja ne temas pri nova vorto, sed pri formo nova en la senco de la oka alineo de la Antaŭparolo kaj ke formon novan rajtas proponi nur aŭtoritata centra institucio. Mi klopodis en la intertempe estiĝinta murmurado klarigi iomete improvize la diferencon inter formo nova, nova vorto kaj internacia vorto per helpo de ekzemploj. Sed mia impresio estis, ke la seminarianoj ne komprenis tiun diferencon; jen fluskemo, kiun mi faris poste:

Vorto-uzado en Esperanto: principoj



Bazo: Fundamento de Esperanto (Antaŭparolo, Fundamenta Gramatiko); lingva respondo n-ro 54 donita de Zamenhof "Pri novaj vortoj" (en: "Lingvo Internacia", 1904, p. 336-338)

Kompilata de: Andreas Kück; dato: 2016-11-17